



# Novjorka Prismo

Numero 125 Junio 2003





**Esperanto Society of New York**

## VENU AL NIA SOMERA PIKNIKO!

### Come to our Summer Picnic!

**When:** **Saturday, June 21, 2003**, 11 A.M. *Rain date: Sunday, June 22.*
Call Tom in the morning (212-477-6516) if in doubt about the weather.

**Where:** **Riverbank State Park**, 137th Street at the Hudson River (directions, page 2).

**Bring:** Lunch for yourself or to share, songs to sing, musical instruments to play, Esperanto poems, jokes, or short stories to read aloud, games, balls, etc.

**Children, family, and friends are all welcome!**

## Protokolo de la kunveno de la 16-a de majo 2003

Je 7:05 ptm, Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon. Ĉeestis 13 personoj. Ĉi tiu kunveno estis nia lasta en la konstruaĵaro de UFT apud la angulo de Orienta 21-a Strato kaj Park Avenuo Suda. Oni esperas, ke UFT permesos al ni uzi ĉambron en ties nova konstruaĵo ĉe 50 Broadway, sed la nova loko ne estas tiel taŭga kiel la malnova loko. Tomaso kuraĝigis la ĉeestantojn pripensi alian lokon por niaj kunvenoj.


Jeff BLAKESLEE estas nova membro de nia klubo, kaj ĉi tiu kunveno estis lia unua formala kunveno. Lia unua kunveno estis la neformala kunveno la 4-an de majo. Jeff komencis lerni Esperanton antaŭ multaj jaroj, sed li neniam parolis la lingvon antaŭ ĉi tiu monato. Li ankaŭ studis la francan, la rusan, la ĉinan kaj la hispanan.

Tomaso diris, ke estis li, kaj ne Nijl BLONSTEIN, kiu menciis, ke oni montras la filmon "Incubus" en loka teatro. Ankaŭ, oni menciis, ke la familia nomo de la persono el Japanio, kiu ĉeestis la aprilan kunvenon, estas INUI, ne INU. "Inu" havas la signifon "hundo" en la japana. Tuj poste, la protokolo estis akceptata.

Nijl menciis, ke bona loko por la ĉi-jara pikniko estas Riverbank State Park, apud la rivero Hudson, inter la 135-a kaj la 145-a Stratoj. Tomaso persone vizitos la lokon por kontroli ĉu ĝi taŭgas por nia pikniko. La ĉeestantoj decidis, ke la pikniko okazos la 21-an de junio, la unua tago de somero.

La ĉeestantoj ankaŭ diskutis pri lokoj por someraj renkontiĝoj. La dimanĉaj kunvenoj ĉe IBM povas daŭri, kaj ni povas aldoni aliajn somerajn renkontiĝojn. Ni povas rigardi filmojn kaj viziti ĝardenojn, havenojn kaj bibliotekojn.

Tomaso klarigis, ke la roto de la Kandidatiga Komitato estas por certigi, ke estas kandidato por ĉiuj estraraj postenoj. La komitato devas fari raporton ĉe la novembra kunveno. Marta BERGONZOLI, Rochelle F. GROSSMAN kaj Jeff BLAKESLEE volontulis esti la ĉi-jaraj komitatanoj. Marta estas la estro de la komitato.



*Eliana prelegas pri Brazilo.*

Nijl pagis kvar cent dolarojn por tablo ĉe la Generala Asembleo de la Unitarana Eklezio, kiu okazos en Bostono ĉirkaŭ la tempo kaj la loko de la ELNA Jarkongreso en Kembriĝo. Li petis volontulojn por sidi ĉe la tablo kaj informi la preterpasantojn pri Esperanto. Ĉeestos 6000 personoj al tiu asembleo.

Cécile LOW aĉetis kaj montris al ni anglalingvan kopion de "Masquerade," libro skribita de Tivadar Soros. Soros originale skribis la libron en Esperanto.

Je 7:55 ptm, Nijl prezentis sian amikinon Eliana DANTAS. Eliana prelegis pri sia hejmlando Brazilo, sia belega kaj moderna hejmurbo Natal, kaj la Esperanta movado tie. Ŝi loĝas en la norda parto de Brazilo, apud la Atlantika Oceano. La popolo havas grandan diversecon de naciaj originoj, dialektaj parolmanieroj, kulturoj kaj kutimoj. La lando mem havas diversecon de plantoj, arboj kaj bestoj. En 1960, tridek mil laboristoj konstruis la ĉefurbon, Brazilio. Lula da Silva estas la unua Prezidento ĉe la politike maldekstra flanko. Unu problemo en la lando estas, ke la ĝangalo rapide ŝanĝiĝas en dezerton, ĉar oni fortranĉas la arbojn. La Esperanta movado en Brazilo komenciĝis en 1948 en Natal.

Je 8:31 ptm, Tomaso prezentis klubanon Jon LIECHTY, profesia muzikisto, kiu ludis siajn aranĝojn de kantoj de Azerbajĝano. La komponistoj de la kantoj estas nekonataj. Poste, Jon ludis la bone konatan himnon de la Esperanto movado, "La Espero." La ĉeestantoj kantis dum Jon ludis la klavaron.



*Jon ludas la klavaron.*

Je 8:54 ptm, Tomaso oficiale fermis la kunvenon. Tuj poste, kelkaj ĉeestantoj iris al la manĝaĵvendejo-restoracio Emma's Dilemma por manĝi kaj trinki kaj babili. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*



*Oni babiladas dum eble la lasta renkontiĝo ĉe nia kara restoracio Miss Kim's / My Cousin Vinny's / Emma's Dilemma.*

## ESNY SUMMER CALENDAR 2003

The following Esperanto get-togethers will take place this summer.
For more information, directions, etc. contact Thomas Eccardt, or one of the other officers listed below.

| | |
|---|---|
| **June 21**<br>**Saturday 11:00 AM** | **Riverbank State Park.** 137th Street at the Hudson River.<br>Our annual ESNY summer picnic. See the announcement on page 1 and directions below. |
| **July 6**<br>**Sunday 1:00 PM** | **IBM Plaza.** 590 Madison Avenue at 56th Street, NYC, street level in the atrium. Rain or shine.<br>Indoor babilado. By popular demand, we will meet once this summer in our Sunday living room. |
| **July 25**<br>**Friday**<br>**6:30 PM** | **"Legally Blonde" free film at Riverflick on Pier 25.** Franklin Street at the Hudson River.<br>**La KVARAN vendredon de julio.** Take the #1 train to Franklin Street and walk west; or the #1, 2, 3, A, C, or E train to Chambers Street, walk west to the Hudson River, then walk north. If you can't find where we are seated, wait near the projector, until one of us notices you. The movie will begin at dark (~8:00-8:30PM). Seating and free fresh popcorn available. No rain date. |
| **August 3**<br>**Sunday**<br>**1:00 PM** | **Esperanto Kafejo.** 114 MacDougal Street at Minetta Lane (a little north of Houston St. and just east of Sixth Ave.). D, B, or K train to West Fourth Street; walk east along West Fourth, then south along MacDougal. This is the second New York eatery to use the name Esperanto. After kafo, we'll wander over to Washington Square Park to admire the stone statuary and the unusual people. Rain or shine. |
| **August 15**<br>**Friday**<br>**6:30 PM** | **Winter Garden babilado.** We will "retake" the Winter Garden, beautifully restored last September after the WTC disaster. Use Liberty St. bridge to World Financial Center and walk north (right) to Winter Garden. Or cross West St. at Vesey St. and walk south (left) to Winter Garden. Meet at tables nearest to river inside glass-covered Winter Garden. Take any train to Fulton St., Cortlandt St., or WTC and walk west. Rain or shine. |
| **September 7**<br>**Sunday**<br>**1:00 PM** | **Outdoor babilado/pikniko at Columbia University.** On benches in shady area in front of Uris Hall, just behind Low Library. Take #1 or #9 subway or else #104, #60, or #4 bus to 1 16th Street. Enter campus at Broadway & 116th St., walk along tree-lined mall, climb Low Library steps (w/statue of Alma Mater) on your left, and then walk to opposite side of Low. #11 bus to 116th St. is also useable, but from Amsterdam Ave. entrance stairs will be on your right. If it's raining, go to Ollie's restaurant at 116th St. & Broadway instead. |
| **September 19**<br>**Friday 6:30 PM** | **United Federation of Teachers.** Next regular ESNY meeting. Check your *Prismo* for new venue. Come hear about the summer's Esperanto conferences and tell us about your summer! ★ |

## IBM Plaza

La unuan de junio, la ESNY estraro kunvenis je tagmezo ĉe IBM Plaza. Ni decidis donaci $100 kaj 6 Esperantajn lernolibrojn al "Zawadi" aŭ "Zinduka", la afrikaj helpaj organizoj, pri kiuj Brian Singer parolis ĉe klubkunveno. Ni lamentis la malfruecon de *Prismo* kaj de la program direktado, kaj sugestis rimedojn.

Poste, je la unua, pli da homoj alvenis kaj babiladis kaj diskutis pri multaj aferoj kiel la venonta ELNA Jarkongreso en Bostono. Ankaŭ litova esperantisto Arvyda KAZLAUKAS alvenis kaj prezentis sin al nia grupo. Li intencas resti dum longa periodo en Usono, kaj oni invitis lin aliĝi al nia klubo. ★


*– Tom ECCARDT*

## Ĉu via lasta *Prismo*?

Estas la politiko de ESNY sendi sian novaĵ-leteron nur al homoj kaj grupoj kiuj resendas la verdan slipon (aliĝilon). Tio helpos nin direkti *Prismon* al la homoj kiuj plej ĝuas ĝin. Do en septembro, se vi ankoraŭ ne resendis la slipon, anstataŭ ekzemplero de *Prismo*, vi ricevos leteron, kiu klarigos kiel vi povas renovigi vian abonon. ★

## How to get to the picnic

**Address:** Riverbank State Park, 137th St. at the Hudson River, Manhattan. Meet in shaded area just south of running track (see map). Bring bathing suit if you'd like to join some of us in the indoor pool.




**By car:** Take Riverside Drive to 145th Street and drive right in. You will have to walk south in the park the distance of a few city blocks to reach the southern end of the running track (see map).

**By train:** Number 1 subway to 137th St & Broadway. Walk one block west and cross pedestrian bridge at Riverside Drive a little north of 137th St.

**By bus:** #4 or #5 bus to 137th St. & Broadway, and walk one block west and cross pedestrian bridge at Riverside Drive a little north of 137th St. Or take #11 Riverside Drive bus directly to the pedestrian bridge.

**Raindate** is Sunday June 22; call Tom if in doubt about the weather or if you have any questions: 212-477-6516. ★


ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto: Thomas Eccardt (212) 477-6516
Koresponda Sekretariino: Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
Protokolisto: Stuart Green (631) 751-5683
Vicprezidanto: Thomas Leong (718) 981-4252
Kasistino: Sofiya Soskina (914) 738-6084
Program-Direktoro: Neil Blonstein (212) 663-2020



**Novjorka Prismo**
Numero 125 – Junio 2003
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

Redaktoro: Jim Medrano (212) 982-5029
Subredaktoroj: Thomas Eccardt, Nancee Medrano
Desegnistino: Mary Pulley

Sendu kontribuajojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com



© 2003 Esperanto Society of New York